

Kulturaj Kajeroj

É.MAHÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 15 fkoj
Bonfara : 20 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

JANUARO - FEBRUARO

1974 1

KULTURAJ KAJEROJ

1974 — JANUARO - FEBRUARO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo — A. Frangeul

Nantes, invito al vojaĝo

Lemurio, aŭ kontinento de Mu — E. Motillon

Lumineskaj bestoj

La nekonato — P. Boulogne

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

Se vi promenus nun tra la koridoroj kaj ĉambroj de Grésillon, vi ne kuraĝus meti la manon sur la tabloj aŭ la seĝoj. Dika tavolo de polvo kovras ilin kaj la plankon. Vidante tion oni povus pensi, ke taĉmento de laboristoj traboras murojn kaj faligas plafonojn. Tute ne. Nur unu laboras tie. Sed fakte li ekzercas sian talenton sur la tuta dua etaĝo kaj parte sur la unua. Granda laboro, granda elspezo kaj verŝajne neniu vidos la rezulton. Ĉar temas pri ŝanĝo de la tuta elektro-sistemo sur la dua etaĝo. Tion ni planis jam de du jaroj. La elektro-instalaĵoj datumis de 1951-52. Kaj de tiu dato la ĝenerala cirkvito estis plusarĝita de multaj lampoj. Fariĝis do necese ŝanĝi la tutan ĝeneralan cirkviton de la dua etaĝo despli ke la malnova konsistis el tuj post milita materialo. Ion tamen vi povos vidi : la elektrajn sekur-blokojn, kiuj en la koridoroj kaj ŝtuparoj, montros al vi la vojon eĉ okaze de ĝenerala paneo de la elektra sistemo.

La ĉijaraj aktivaĵoj prepariĝas. La programo de ĉiu periodo preciziĝas. Ni esperas, ke la vizitantoj estos multaj kvankam la financa situacio ne estas tre ĝojiga en niaj landoj. Pro tiu necerteco pri la venontaj monatoj, aŭ pli precize, pro la certeco, ke la prezoj, kiuj jam altiĝis de post oktobro, daŭre altiĝos ĝis julio, ni decidis, ke la tarifoj fiksitaj en oktobro valoros por la printempa Seminario, kaj ke ni fiksos novajn en aprilo. Ĝis nun ni modifis la tarifojn en oktobro laŭ la plialtiĝo de la prezoj okazinta ĝis tiu dato. Sed tiuj tarifoj valoris por la posta jaro. Ne tre gravis, kiam la ĝenerala plialtiĝo ne estis tre granda. Nun ne plu eblas. La novaj tarifoj verŝajne ricevos en aprilo plialtigon de 8 aŭ 10 %. Niaj amikoj certe komprenos, ke tion ni faras nur por ke daŭre vivu nia asocio.

P. BABIN.

Por plezurigi vin aŭ la aliajn

okaze de la finjaraj festoj

CENTJARDAŬRA
ESPERANTA KALENDARO

Eleganta sur via skribotablo
Praktika en la uzado
ebligas trovi iujn ajn datojn de la jaro 1900 ĝis la jaro 2000

dimensioj : 10,5 × 16 cm.

Prezo : 50,00 fr. fr. + 10 % por afranko



Esperanto tra la Mondo

LA KONGRESOJ KAJ RENKONTOJ EN 1974

Krom la universala kongreso en Hamburgo (27.7 - 3.8) kaj la kongreso de S.A.T. en Bergamo (3 - 9.8), oni jam interalie anoncis :

— « Internacia Junulara Konferenco », organizita de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (T.E.J.O.), de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto, en Münster. Skribi al : Konferenco de T.E.J.O., Gisela Jungkamp, Mondstrasse 3, D-44 Münster (F.R. Germanujo).

— « Komuna Ekumena Kongreso » de Kristana Esperantista Ligo Internacia (K.E.L.I.) kaj Internacia Katoliko Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.), kiu okazos dum la semajno antaŭ la U.K. en Hamburg-Langenhorn.

— « Kongreso de la Fervojistoj » (I.F.E.F.), en Tarragona (Hispanio), 11-17 de Majo.

EN FRANCIO

— La Printempa Kultura Semajno de Junulara Esperantista Franca Organizo (J.E.F.O.) okazos de la 23a ĝis la 29a de Marto en la Kastelo Grésillon, Baugé, la Esperantista Kulturdomo. Skribi al J.E.F.O., 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris.

— S.A.T. amikaro havos sian kongreson dum Pasko, en Agen. Adreso : R. Chassard, B.P. 195, 47007 Agen.

— La kongreso de Unuiĝo Franca por Esperanto (U.F.E.) okazos en Saint-Etienne, de la 30a de Marto ĝis la 2a de Aprilo. Informoj ĉe U.F.E., 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris.

— La kongreso de Franca Katolika Esperanto Asocio okazos en Angers, en religia domo, la 11a kaj 12a de Majo. Interesa programo estas preparita. Skribi al S-ro R. Despiney, 43, Quai de Champagne, 94170 Le Perreux-sur-Marne.

SIGNIFA EVENTO POR LA FRANCAJ ESPERANTISTOJ

La 12 an de Decembro, dum gazetara koktelo, oni prezentis la novan lernolibron de la fama metodo Assimil : « L'Esperanto sans peine », verkita de J. Thierry, lingve kontrolita de Prof. G. Waringhien. La libron povas akompani serioj da diskoj, kasetoj aŭ bendoj, kun voĉoj de konataj esperantistoj. En tri jaroj, ĉi-tiu libro estas la kvara en Francujo publikigita de neesperantistaj eldonejoj, nome : « Vocabulaire esperanto » de Prof. Duc-Goninaz (Ophrys), « Je parle esperanto » de J. Thierry (Marabout-Flash, nº 345), « L'Esperanto » de Prof. Janton (Que sais-je ? nº 1511, P.U.F.).

Se la francaj esperantistoj konscias pri la graveco de tiu fakto kaj bone reklamas kaj uzas tiujn eldonaĵojn, ili povas antaŭvidi favorajn sekvojn por la movado.

EN LA UNIVERSITATO DE AIX-EN-PROVENCE ...

Esperanto estas oficiale instruita en la francaj universitatoj de Clermont-Ferrand kaj Aix-en-Provence.

En tiu lasta universitato, notinde, la internacia lingvo estas ekzamena studobjekto kaj elektebla fako en la kadro de la ŝtata diplomo D.E.U.G., kiun akiras la studentoj post dujara studado.

La esperanto-fako volonte kontaktos aliajn universitatojn kie Esperanto estas instruita ; ĝi ankaŭ akceptas donacojn de libroj.

Adreso : Université de Provence, Section Esperanto. (I.L.G.E.O.S.), avenue R.-Schumann, 29, F - 13100 Aix-en-Provence.

... KAJ EN LA UNIVERSITATO DE SEŬLO

Ekde 1965, en la universitato Meong-Ji de Seŭlo (Koreo), Esperanto estas elektebla studobjekto. Krom regulaj universitataj kursoj, la universitato organizas ankaŭ somerajn popolkursojn. Lastan jaron, pli ol 600 personoj aliĝis al tiuj kursoj.

EN F.R. GERMANUJO

Okazas nun regule intensaj esperantaj kursoj pere de lingvo-laboratorio por trejnado de esperantaj instruistoj, por enkonduko de la lingvo en lernejoj (Bielefeld, Paderborn, Siegen, Bochum, Gronaŭ).

GAZETO POR INFANOJ KAJ PLENAĜAJ KOMENCANTOJ

Aperis la unua regula numero de la porinfana ilustrita revuo « Juna Amiko », ĉefe destinita al lernejanoj. Abono por tri numeroj kostas 2,10 nederlandajn gld.. La gazeto havas kunlaborantojn en multaj landoj. Adreso : Hungara Esperanto-Asocio, P.F. 193, H-1368 Budapeŝto, Hungario.

POR EŬROPAJ GEINSTRUISTOJ

Ekzistas la ebleco, se sufiĉe da abonoj estas kolektitaj, ke revuo por instruistoj, eldonita de la Eŭropa Kulturcentro, en Ĝenevo, aperu ankaŭ en Esperanto.

La jarabono kostas 10 gld. por 10-12 numeroj.

La interesatoj tuj skribu al S-ro Van Aelst, 56, bd V.-T.Lambert, B - 1070, Bruselo.

RADIO : ĈIUSEMAJNAJ ELSENDOJ EL VIENO

Radio-Wien ORF elsendas per mallongaj ondoj, ĉiun sabaton kaj dimanĉon po dekminutan Esperanto-programon.

Por Eŭropo, jen la programskemo (laŭ M.E.T.) : ĉiusabate de la 17, 45a, ĝis la 17,55a sur 49 m. ; ĉiudimanĉe (ripeto de la programo) de la 6,45a ĝis la 6,55a sur 49 m kaj 42 m. Por Aŭstralazio kaj Azio sud-orienta : 16 m sabate kaj 25 m dimanĉe.

Aŭskultu kaj nepre skribu al la nova radio-stacio en Esperanto ! Adreso : ORF-Wien, Dr. Alfred Macher, Argentinierstr. 30a, A - 1040, Wien.

EN POLLANDO, POST TELEVIZIA FILMO

Post prezento de la pola televizia filmo pri Zamenhof kaj Esperanto : « Por ke homo komprenu homon », la pola Esperanto-Asocio ricevis, nur dum la 10 tagoj post la pojekciado, 2080 korespondaĵojn de personoj kiuj deziris informiĝi pri la lingvo.

« AŬSTRALIO HODIAŬ » EN AŬSTRIA TELEVIZIO

Tiu esperant lingva filmo de 24 minutoj estis prezentita en programo de la aŭstria televizio. Verŝajne por la unua fojo, filmo en Esperanto estis prezentita en nacia televizio.

TRADUKA AGADO

— « Pri arto kaj morto » de japano, Miyamoto Masao, aperis en Lisbono, en la portugala lingvo, tradukita el la esperanta originalo.

— La ĉina bildrakonto « Mi volis viziti lernejon » eldonita en Esperanto de Ĉina Esperanto-Ligo, estis tradukita por la tria fojo ; Tiufoje en la germana lingvo.

— La pola semajna literaturgazeto « Wiadomcsci » publikigis multajn tradukojn el la verkoj de esperantaj nunaj verkistoj.

NANTES : Invito al vojaĝo

« Neptuno favoras la vojaĝanton » : Tia estas la devizo de Nantes ; ĝi elvokas la maran forajon, la malproksiman aventuron, la miraĝon de la Insuloj ; ĝi invitas al krozadoj.

Tie la vojaĝanto hezitas : ĉu ripozi sur la oraj plaĝoj de Oceano ? Ĉu vojaĝi al Val de Loire, tiu lulilo de Francio, punktita de la elegantaj turoj de la mezepokaj kaj renesancaj kasteloj ? Ĉu vagi laŭ la malnovaj stratoj kaj elvoki la pasintecon kaj kiel Paul Fort admiri « la plej belajn sunsubirojn sur Loire kaj senti sian koron bati antaŭ ĉiuj tiuj ŝipoj » ?

Ĉar Nantes ludis eminentan rolon en Okcidenta Francio, ĝiaj muroj, ĝiaj kvartaloj, ĝiaj monumentoj rakontas ĝian historion.

Sur la dekstra bordo de la riverego Loire, piede de monteto, kiun la rivero ĉirkaŭas, Nantes etendas siajn mallarĝajn stratojn kaj siajn kajojn ; ĝi estas ĉefurbo de departemento Loire-Atlantique ; la nomo mem pentras la pejzaĝon kaj etoson. Erdre-kaj-Don riveroj, Vioreau-kaj-Domenech lagetoj, montetoj rande de Loire-kaj-Sevre riveroj kaj la fama vitejo, ricevas el nebula Bretonio, el la leĝera helo de Vendeo, unikan atmosferon, kies lumo ĉiutage komponas ŝanĝiĝantan, delikatan paleton. Ĉu vere Trojanoj kaj Samnitanoj tie instaliĝis ? Ĉu vere posteulo de Noe kreis la urbon ? Pli certe, ĉi tie, la vojo de la karavanoj kruciĝis kun tiu de la ŝipoj, kiuj atingis Luaron. Tie la Namnetanoj instalis sian « oppidum » Caudivicum. Dum la Roma okupado « Portus Namnetum » estis sidejo de la Luaro-Navigistoj kaj fortigita urbo.

En 843 la normandaj barkoj laŭsekvas Luaron ĝis Nantes ; longaj kaj mallarĝaj ili estas plej zorge konstruitaj : oni povas ilin malmunti kaj porti sur brakoj ; iliaj veloj kaj remiloj permesas iri sur profunda maro aŭ sur rivero .De Nantes, la Normandoj disradias sur la tuta Bretonio kaj dum unu jarcento amasigas ruinojn.

En 937-940 la juna Alain Barbe-Torte, posteulo de bretoniaj ĉefoj, rifuĝinta en Anglujo, revenas hejmen, forpelas la Normandojn kaj rekonstruigas la urbon. Tamen nur kun François II kaj lia filino Anne de Bretonio, Nantes retrovas pacon kaj trankvilon. Anne edziniĝis al Charles VIII kaj, post sia vidvineco, al Louis XII. De tiam Bretonio kaj Nantes apartenas al Franca Reĝejo.

En 1466, François II konstruigas la Dukan Kastelon ; ĝis estas masiva, mezepoka poterno kun siaj turoj, siaj remparoj, sia akvo-zono. Tie ĉi la vivo estas pompa, reĝeca, brila, libermora ; 5 ministroj, 3 konsilianoj asistas la Dukon ; 17 ĉambelanoj, 4 hotel-mastroj, multaj, sekretarioj, eskviroj, lakeoj lin servas ; ĉasado, falkoĉasado ĉefe okupas la korteganojn. Povas okazi ke la ŝercoj estas iom krudaj : kelkfoje, je la vek-horo, ŝerculoj eniras en ĉambrojn, kaptas la dormantojn kaj ilin ĵetas en la ĉirkaŭfosajon : malvarma estas la akvo ! eĉ la Duko povas esti kaptita ; por eviti la banon li preferas pagi elaĉetmonon.

La interna korto de la kastelo montras diversepokajn konstruajojn ; ili entenas muzeojn pri bretonaj hejmoj : mebloj, uziloj, potajoj, ceramikajoj, kostumoj ; eĉ modeloj de belaj iamaj ŝipoj dormas en vitraj kaĝoj.

Memorigi la eventojn, kiuj okazis en tiu kastelo estas rakonti la historion de Nantes : sieĝoj, atakoj, arestoj : Vana sieĝo de Buckingham en 1381 ; Proceso de Gilles de Rai ; Naskiĝo (1477) kaj edziĝo (1499) de Anne de Bretonio. Henri la IV-a kaj subskribo de Edikto de Nantes (1598) favore al Protestantoj.

Multaj estas la malliberuloj, kiuj restadis tie : Kardinalo de Retz ; Intendanto Fouquet, arestita de d'Artagnan ; Pontcallec-konspirantoj ĉi tie juĝitaj. La 1789-Revolucio abunde plenigis la malliberejon. En 1832, la Dukino de Berri, kontraŭa al Louis-Philippe, estas tie enkarcerigita.

Tute proksime de la Kastelo staras la Katedralo ; ĝia konstruado, kvankam longedaŭra (1434-1892) konservis al ĝi ĝian unikan stilon ; ĝia gotika fasado plej impresas ; super la portaloj, kies volbiĝoj estas fajne skulptitaj, staras du turoj 60-m-altaj. Interne la volbo atingas 37,5 m. Tie ĉi, ĉio estas konstruita funkcie de leviĝo : duoblaj vertikalaj lignoj ŝprucas el planko kaj, per nura tiro, atingas la volboŝlosilojn, kie ili interkruciĝas ; nenia misharmonia noto ĝenas la rigardon.

Estas en 1817, ke la katedralo ricevis la tombomonumenton de François II kaj Marguerite de Foix, lia edzino ; (antaŭe en Carmes-preĝejo kaj kaŝita dum la Revolucio) ; ĝi estas renesanca (1507) ĉefverko de Michel Colombe de bretonia deveno.

Duko kaj Dukino kuŝas sur slabo el nigra marmoro. La anĝeloj, kiuj subtenas la kapon de la kuŝostatuoj elvokas ĉielan akcepton ; ĉe piedoj de François II leono simbolas potencon ; la leporhundo de Marguerite, la fidelecon. Kvar grandaj statuoj ĉe la anguloj de la monumento personigas la kvar kardinalajn virtojn : Por Français II : *Justeco,* kun krono sur kapo, tenas glavon en sia mano. *Forteco,* kun kasko kaj armajo, eltiras drakon el turo.

Por la Dukino : *Prudenteco* : antaŭflanke junulino kun spegulo montras estintecon, malantaŭflanke maljunulo montras pasintecon. Prudenteco konsideras pasintecon antaŭ ol iri al estonteco *Sobreco* tenas bridomordajon kaj simbolas kontrolon de la pasioj ; apuda horloĝo alportas ideon de mezuro.

Nun ni laŭiras la malnovajn stratojn ; jen, el Mezepoko, la pordo St Pierre kaj ruinajoj de fortikajoj ; el la 15a jarcento jen la eleganta Psallette, loĝejo konstruita en pajlargila mortero ; jen samaj konstruoj en stratoj « la Juiverie », « Baclerie ».


Inter la 16-a kaj 18-a jarcentoj, Nantes plej riĉiĝis pro du riĉofontoj : Sukero kaj « ebeno-ligno » (sklavokomerco). La negrista ŝipo eliras el Nantes

kun manufakturaĵoj destinitaj al Antiloj ; ĝi haltas en Gvineo ; per kelkaj tombakaĵoj kaj iom da brando la Kapitano havigas al si proksimume 800 nigrulojn ; oni ilin amasigas en falsa ferdeko ; multaj mortas dum la vojaĝo. La negristo vendas ĉiun postvivanton po 250 pundojn. La revena kargo estas kano-sukero, kiun oni rafinis en Antiloj kaj vendos en Francio. La profito atingas 200 %. La tiamaj filozofoj tondras kontraŭ tiu malhumana komerco ; tamen, Voltaire, mem, kies aferistan sencon oni bone konas, havas akcion 5 000-pundan sur Nantana negrista ŝipo !

Fine de la 18-a jarcento, Nantes estas plej prospera ; ĝi estas la unua franca haveno kun 2 500 ŝipoj kaj barkoj. La ŝipekipistoj kaj la komercistoj formas veran kaston kaj verajn dinastiojn. Ili konstruigas al si luksajn domojn laŭlonge de la Fosse-Kajo kaj en Insulo Feydeau. Tiu insuleto kuŝis piede de la remparoj. Intendanto Feydeau ĝin transformis helpe de nederlandaj kaj italaj arkitektoj specialiĝintaj en surfostaj konstruaĵoj ; la belegaj domoj havas balkonojn el forĝita fero subtenatajn de kariatidoj kaj ornamitajn je maraj konkoj en kiuj barbaj Tritonoj blovas. Ne plu estas insulo. La sablo malaperigis la brakojn de la rivero.

La 18-a jarcenta urbo naskiĝis dank'al mecenato, la financisto Graslin. Li donacis al la urbo la vastan terenon, kiun li posedis. Sur tiu loko, arkitektoj Ceineray kaj Crucy kronstruis belegajn « Hotelojn » : Montaudouin, d'Aux, Pepin de Bellisle ; en tiu ĉi lasta loĝis, dum la Revolucio, la deputito Carrier ; li opiniis tro lanta la gilotinon ; li ordonis, ke oni dronigu la malliberulojn en la rivero. Robespierre lin kondamnis kaj gilotinigis.

Tute nova kvartalo naskiĝas : la Reĝa Placo ricevis en 1865 belan fontanon : Luaro kun ĝiaj flankriveroj. La Strato Crebillon, mallarĝa sed komerca ; en la vespero la Nantanoj promene laŭiras ĝin ambaŭsence ; oni diras, ke ili « crebijonas ». La Korso Cambronne estas randestarita de belaj domoj kun pilastroj ; en ĝia mezo staras la statuo de la generalo pli konata pro sia « vorto » ol pro siaj gloraj militiroj.



Industria periodo :

La Revolucio aboliciis la sklavkomercon. Pro la blokado kontraŭ Napoleono oni anstataŭigis sukerkanon per sukerbetoj, kulturitaj en Francio. Plue la ŝipoj pliigas sian tonelaron kaj ne plu povas atingi la kajon tro malmulte profunda. Por ricevi tiujn ŝipojn, Nantes turniĝas al St Nazaire, kiu, post 20 jaroj postulas sian liberecon. Nantes kreas kanalon : Nantes-Paimbœuf. Sed nune Nantes preferas, per potencaj rimedoj, dragi la estuaron. Kaj ŝipoj kun 8 metra enakva alto povas alporti karbonon, lignojn, fosfatojn, sukeron kaj arakidojn.

La komerca urbo turniĝas al metalurgio kaj nutraj fabrikadoj ; ŝipkonstruadoj, ŝipriparadoj, metalaj kaj mekanikaj konstruaĵoj, petrolo-rafinejoj, traktado de transmaraj produktoj.

Nutraj fabrikadoj kondukas al konservado de nutraĵoj. Enladigado uzis la patenton de Appert (1809). Kaj kreiĝas rafinejoj, sapofarejoj, farun-industrio, ĉokoladejo, rizmuelejo, tapioka-fabrikejo, bisvit-faradejo kaj konservo-uzinoj. Tiu nova vivo okazigas konstruadon de novaj komercaj centroj kun magazenoj, hoteloj, domegoj, en kiuj ĉiujare okazas diversaj manifestadoj : foiroj, ekspozicioj (vinoj, floroj), festivalo pri drama arto. Jen la Pasejo Pommeraye (1845) : la ŝtupoj, kiuj kondukas al la etaĝoj estas subtenataj de fergisaj muzoj, delikate skulptitaj. Stratoj Marne, Calvaire ; la Bulvardoj, kiuj kovras la antaŭajn brakojn de Luaro kaj Erdre ; la Neptuno-ensemblo.

Jen la Palaco Dobrée (19-a j.) ; ĝi apudas la nobeldomon de Duko Jean V (15-a j.) ; tiu palaco entenas kolektojn (de prahistorio ĝis La 18-a j.) : gravuraĵojn, pentraĵojn, meblojn, tapetojn, artaĵojn, manuskriptojn, armilojn, historiajn memoraĵojn. Dobrée, kolektanto, donacis ambaŭ domojn al la Departemento.

Kaj jen la Placo Generalo-Mellinet, kies arkitektura ensemblo estas Restaŭrado-stila, unika en la franca provinco.

En la centro mem de la urbo ni povas halti en agrablaj ripozejoj : la Botanika Ĝardeno montras plej artan pejzaĝon. Jen la Dobrée-Rozujoj. La skvaroj « la Monnaie », « Misery », rigardas al la haveno. La Parkoj « Procé », « la Gaudinière », la korsojn St Pierre, St André superstaras la belaj 18-a kaj 19-a jarcentaj domoj.

Famaj viroj naskiĝis en Nantes : Boffrand, dekoraciisto de Soubise-Hotelo en Parizo ; Cambronne, Lamoricière, kiu kaptis Abd-el-Kader ; Aristide Briand ; Jules Dupré, pentristo ; Elie Delaunay, kiu dekoraciis Pantheon kaj la salonon de Pariza Operejo ; Jules Verne ; Charles Monselet, kronikisto, kiu bele kantis la bonan manĝon kaj la bonan trinkon en la Nantes-regiono.

Ja, vi konas : anaso, blanka-butero, Muskadet kaj biskvitoj !

LEMURIO, aŭ Kontinento de Mu

Fine de mia artikolo pri la « Universala Diluvo » aperinta en la numero 5 de « Kulturaj Kajeroj », mi diras, ke la antaŭdiluvaj civilizoj daŭris proksimume 300 000 jarojn.

Se vi konsultos libron pri antropologio, vi sendube trovos, ke tiu nombro estas troega. La oficiala scienco deklaras, ke maksimume antaŭ 200 000 jaroj aperis la « homo sapiens » t.e. la « scianta homo » apenaŭ elvolvinta el la animala stato. Ankaŭ ĝi asertas, ke la pafarko kaj sagoj estas ne pli aĝaj ol 15 000 jaroj. Nu, tiuj datoj ankoraŭ instruataj en niaj Universitatoj estis jus malkonfirmitaj pro la eltrovo de homa kranio en geologia tavolo, kiun specialistoj kalkulas aĝa je 2 800 000 jaroj. Pli ĵuse, du francaj prahistoriistoj eltrovis en kaverno nomita « Border » en Zŭajlando en Afriko, homajn restaĵojn, el kiuj unu kompleta skeleto tute similas je skeleto de moderna homo. Krome, ili eltrovis multegon de laboriloj reale teknike perfektaj. Laŭ la kalkuloj, tiuj restaĵoj estas almenaŭ cent mil-jaraj...

Antaŭ malpli ol cent jaroj, en Eŭropo, famaj kleruloj, membroj de Akademioj kaj sciencaj asocioj, asertis, ke homaro estis proksimume ok mil-jara. Tiu opinio estis bazita sur tiam ĝenerala kompreno de la Biblia genealogio. Neeble estas, en tiu artikolo, montri la sinsekvajn etapojn antaŭintajn la nunan scion. Modernaj verkistoj dediĉis tutajn librojn je tiu studo. Mi nur provos skizi mallongan historion de nia Tero, laŭ la nerefuteblaj pruvoj amasiĝintaj ekde pli ol du jarcentoj. Historio kies diskonigo estis malhelpita de la rutino de iuj, antaŭjuĝoj, kaj eĉ malsincereco de aliaj ; ankaŭ pro vera « konspiro de silento », kaj persekutoj kontraŭ la kuraĝuloj, kiuj maltime kuraĝis proklami veraĵojn. Bedaŭrinde, tiu negativa mensostato ne estas ankoraŭ tute malaperinta !

Kiel mi jam diris, la granda kosma kataklismo nomita « Universala Diluvo » okazis inter 10 aŭ 12 miljaroj antaŭ la nuntempo. Ĝi estis ne nur inundego, sed ĝin akompanis potencaj vulkanaj erupcioj. gigantaj tertremoj, kaj grandega sismondego, kiu kvazaŭ elbalais la teran surfacon. Pruviĝis, ke de sia naskiĝo, nia planedo suferis multajn modifiĝojn kaj gravajn kataklismojn. La drivado de la kontinentoj, la sismaj skuegoj la vulkanaj erupcioj ŝanĝis — kaj ankoraŭ ŝanĝas — ĝian surfacon, kaj ofte ankaŭ la biologiajn kondiĉojn.

La primitiva civilizo estis kompreneble antaŭita de malfacila popolizado meze de malkonfortaj vivkondiĉoj. Ne eblas apreci la daŭron de tiu unua periodo de la vivo de homaro — eble milojn da jarcentoj. Sed nun ekstaras la unua problemo. Pro la diverseco de la homaj rasoj, estiĝas tiu alternativo : ĉu la homaro elvenis el unu sola grupo (aŭ el unu sola paro, laŭ la religia hipotezo) ; ĉu en la sama epoko kaj samtempe, aperis homaj grupetoj aŭ kernoj sur la tero en malproksimaj lokoj, sen iaj interkontaktoj, evoluintaj dum jarcentoj antaŭ ol reciproka konatiĝo ? Laŭ dokumentoj de ni posedataj, la unua hipotezo aperas valida. La similaĵoj trovitaj inter ĉiuj civilizoj malaperintaj kaj nun ekzistantaj montras komunan originon por ĉiuj homoj. Antropologio eksplikas la rasajn diferencojn per la influo de la vivmedio, la ĉikaŭaĵaro, la nutriĝo, la kutimoj kaj moroj, k.t.p.

Ni povas aserti, ke la unuaj homoj naskiĝis sur tiu vasta primitiva kontinento nomita « Mu » de siaj loĝantoj, kiun la sciencistoj nomis « Lemurio ». La deveno de tiu nomo estas sufiĉe kurioza, kaj estas citinda.

En Madagaskaro, Pacifikaj insuloj, kaj kelkaj partoj de Afriko kaj Azio, eskzistas stranga raso de animaloj konsistigantaj la klaso de « Lemuroj ». Tiu nomo, signifanta « mallumo » estis donita al ili el latina radiko, ĉar ili ĉiuj estas noktaj bestoj, dormantaj dum la tago. Tiu klaso de « Lemuroj » aŭ « prasimioj » konsistas el malgrandaj animaloj similantaj simiojn, havantaj kvar manojn kun tre bele formitaj fingroj. Ilia vizaĝo aspektas preskaŭ homa kun larĝaj rondaj okuloj. Diversaj specioj estas konataj laŭ la nomoj : lemuroj, makioj, tarsioj, hierogaloj, lepilemuroj, k.a. La eltrovo de prahistoriaj, grandtaliaj skeletoj de lemuroj, precipe en Madagaskaro kredigis, ke ilia originejo estis la malaperinta kontinento. Tial, tiu kontinento estis nomita « Lemurio ». Dum la lasta jarcento, oni eĉ hipotezis, ke la homo estas ido de tiuj lemuroj. Tiu opinio ne plu estas akceptata de iu ajn klerulo.

La vasta kontinento Lemurio, kiu etendiĝis de la Japana maro ĝis la nuna Ameriko, jam parte enprofundiĝis je epoko, kiun oni kalkulas proksimume antaŭ 50 000 jaroj. Tio estigis la leviĝon de Himalajo, de la Tibeta montaro, aliaj Aziaj montoj, kaj eble de la Eŭropaj montaroj. Proksimume antaŭ 38 000 jaroj, okazis la kataklismo, kiu submergis la reston de la kontinento, kaj levigis la Amerikajn montarojn, Andojn, Kordelierojn, Rokan Montaron, k.a., ankaŭ Atlantison. Kelkaj el la eskapintoj de la unua kataklismo rifuĝis en Ameriko. La plej granda parto el la saviĝintoj de la dua katastrofo rifuĝis en Atlantiso. Tie, ili evoluigis la plej brilan civilizon iam ekzistintan en la mondo.

Kion ni scias pri tiuj Lemurianoj aŭ Muanoj ? Evidentas, ke dum 200 000 jaroj, ili havis sufiĉan tempon por evoluigi superan civilizon. Laŭ multaj dokumentoj, gravuritaj ŝtonoj, skribaĵoj sur bestaj feloj, ĉiaspecaj restaĵoj, ankaŭ antikvaj manuskriptoj konservitaj de Ĉinaj, Tibetaj, Hindaj anoj de la esotera societo Rozo-Kruco, oni povas proksimume bildigi la ĉefajn trajtojn de la Lemuria civilizo je ties kulmino.

Tiuj homoj, niaj unuaj prapatroj, estis ĝenerale grandaj. La meza staturo estis proksimuma je 1 metro 80 centimetroj ; ĝi atingis eĉ du metrojn. Vivo en la libera aero, en tropika kaj sunumita klimato igis la koloron de ilia haŭto bronza aŭ kupra. La virinoj, ĝenerale malpli altkreskaj kutimis protekti sian vizaĝon per maldensa vualo, estis renomaj pro la heleco de sia haŭto. La kapharoj, ĝenerale nigraj, estis mallonge tonditaj sur la antaŭa parto de la kapo. Malantaŭe, ili estis longaj, kaj flirtis sur la ŝultroj aŭ estis aranĝitaj laŭ plektaĵoj. La vestaĵoj, malmulte ornamitaj, estis larĝaj kaj malstrikte alligitaj al la korpo. La domoj, konstruitaj el ŝtono, estis maldense grupigitaj ĉirkaŭ la temploj kaj publikaj konstruaĵoj. La laborejoj kaj fabrikoj estis izolitaj de la loĝejoj.

La vivodaŭro estis ofte pli longa ol unu jarcento, kaj povis daŭri 120 aŭ 130 jarojn. La tre aĝa Lemuriano sciiĝis, kiam lia morto aŭ « transiro » estis proksima. Kiam ĝi estis okazonta, li uzis siajn lastajn vivtagojn por definitive akuratigi siajn terecajn aferojn, por ke neniu ricevu malutilon pro lia forpaso. Ne ekzistis heredaj problemoj. Heredaĵo konsistis nur el kelkaj objektoj aŭ simbolaj juveloj, sen alia valoro ol memoraĵo. La Lemurianoj konsideris, ke ĉiuj materiaj aĵoj havas neniam propran valoron tial ili ne amasigis tion, kion ni nomas riĉaĵoj.

La mortonto mem fosis sian tombon, helpate de parencoj aŭ amikoj. Kiam la lasta tago estas alveninta, li eniras en la fositaĵon, ekmeditas, kaj la animo forlasas lian fizikan korpon en kvieteco kaj paco.

Morto estis nek dezirata, nek timata. Ĝi estis rigardata kiel etapo en la vivo de la animo, transiro al nova ekzistomaniero. Reinkarniĝo estis konsiderata kiel justigita kaj demonstrita vero. La religio konsistis el studado de la universalaj kosmaj leĝoj. Oni reprezentis la kreantan Dion, ununuran, universalan, kaj ĉieestantan, per la simbolo de la suno, estiganto de ĉia vivo sur nia planedo. Oni nomis lin RA aŭ RE. La Lumerianoj asertis, ke la universala energio agas per kvar grandaj primaraj fortoj. Ili riprezentis ilin per diversaj simboloj, aŭ grafismoj, kiuj postdaŭras post ili, kaj estas ankoraŭ uzataj nuntempe : la kruco laŭ diversaj formoj, precipe la kruco kun rozo en la centro, la svastiko aŭ hokokruco ; inter iliaj simboloj, ekzistis ankaŭ la cirklo, la triangulo, la kvadra-

to, la spiralo. Ilia religio, tre pura kaj altnivela, estis esence monoteista, kaj sen superstiĉoj. Oni trovis nenian bildon de idoloj, malsuperaj dioj, nek antropomorfaj figuraĵoj de Dio (T.e. Dio figurita laŭ homaj aspektoj).

La socia vivo estis ideala komunuma reĝimo. Ili ignoris monon. Ĉiu laboris por la komunumo, kaj la komunumo prizorgis ĉiun. Egaleco estis perfekta. Estis nek riĉuloj, nek malriĉuloj; do nek sociaj klasoj, nek ebleco de superregado. Oni postulis de ĉiu, nur tion, kion li kapablis pro siaj manlaboraj kaj mensaj eblecoj. Ĉiu ricevis ne nur la necesaĵon, aŭ utilaĵojn, sed ankaŭ iajn lukson kaj komforton, iel supera al tiu, kiun ni ricevas — tre malegale — de nia moderna tekniko. La klerigado estis certigita de la komunumo. Ĝi estis tre ĝuste adaptita al la denaskaj kapabloj de la infanoj. Kuracado estis senpaga. Medicino uzis precipe plantojn. Kelkaj kuracoj estis faritaj per psikaj rimedoj, surmeto de la manoj, k.a. Verŝajnas, ke la Lemurianoj ankaŭ posedis gravajn kirurgiajn konojn.

Geedzeco estis sankta institucio. Ĝi estis rompebla nur de la morto. Geedziĝo neniam estis perforte trudita de la gepatroj, kaj neniam povis okazi pro socialaj aŭ familiaj kialoj. Ĝi estis protektata de tiaj garantioj, kiaj ebligis, ke la geedziĝo estis reale nerompebla.

La vortoj « riĉeco kaj riĉaĵo » laŭ nia kompreno, estus sensignifaj por la Lemurianoj. Ĉiuj necesaĵoj de la vivo estis certigitaj de la socia organizo ekde la unua vivospiro, ĝis la fina transiro. Ili do havis nenian kialon por amasigi riĉaĵojn.

Ili estis nek ĉasistoj, nek militistoj. Iliaj armiloj, pafarkoj kaj sagoj, estis kreitaj nur por sin defendi kontraŭ la gigantaj sovaĝaj bestoj svarmantaj en la vastaj praarbaroj. Milito estis al ili nekonata, eĉ ankaŭ nekomprenebla. Ilia nutraĵo ne estis ekskluzive vegetara, ili manĝis malgrandajn bestojn kaj fiŝojn. Agrikulturo estis tre progresinta. Ili konis la cerealojn, multajn legomojn, kaj fruktojn. Ŝajnas, ke ili ne uzis alkoholon.

La artoj estis tre disvolvitaj, laŭ tio, kion ni povas dedukti el la eltrovitaj desegnoj, pentraĵoj, gravuritaj ŝtonoj, kaj juveloj. Arkitekturo estis mirinda, kaj uzis teknikajn rimedojn tre malsimilajn je la niaj, kaj de ni nekompreneblajn. Atestas pri tio, la mirigaj antaŭdiluvaj monumentoj postrestintaj post la kataklismoj: la Granda Piramido de Egiptujo nomita Piramido de Ĥeops, la piramidoj kaj temploj de Sud-Ameriko, la pordo de Tiahuanako, la terasoj de Baalbek la ciklopa muro trovita en la oceano apud la insuloj Bahamoj, k.t.p.

Ni havas malmulte da informoj pri ilia industrio. Oni trovis plimalpli fragmentajn desegnojn kaj planojn de maŝinoj, sed ne eblas kompreni ties celon kaj uzadon. Ŝajnas, ke ili kaptis, kaj utiligis la sunan radiadon. Ili disponis potencajn lumigilojn publikajn kaj privatajn. Ili kuiris per aparatoj similaj je niaj elektraj kuirformoj. Tamen, oni ne trovis uzinojn similajn je niaj elektraj centraloj. Iliaj aviadiloj forme malsimilis la niajn, kaj estis senbruaj. Ili konis la navigadon per veloj kaj per maŝinoj. Oni trovis motorojn similantajn niajn eksplod-motorojn, ŝajne ili ne uzis vaporon. Ni do povas konkludi, ke ili posedis fontojn de energio nekonatajn de ni.

La ekspluato de mineraloj estis tre disvolvita; ĉu per eksteraj minejoj, ĉu per subteraj. Krom la konstruŝtonojn ili utiligis kelkajn mineralojn por celoj de ni nekonataj kaj nekompreneblaj. Oro kaj arĝento tre abundaj en kelkaj lokoj neniam estis uzitaj por komercaj aŭ financaj interŝanĝoj. Ili estis uzitaj nur por delikataj mekanismoj aŭ por faro de artaĵoj kaj simbolaj juveloj, kaj por ornamo de konstruaĵoj. Same por la gemoj, al kiuj ili atribuis nenian specifan valoron.

Por la interkomunikoj, ili havis tre belajn vojojn, sur kiuj cirkulis veturilojn tiratajn de bestoj similaj je kameloj. Estis ankaŭ senradaj veturiloj, probable veturantaj sur aertavoloj. Ni ne scias, ĉu ili havis ion similan je niaj telegrafo kaj televizio. Sed ili havis psikan disvolviĝon apenaŭ koncepteblan de ni. Telepatiaj komunikoj eĉ grandadistancaj estis konstante uzataj. Stranga fizika apartaĵo kredigas, ke ilia pineala glando estis eksterordinare kreskinta. Temas pri tre videbla tubereto supre kaj meze de la frunto.

Tre probable, ili uzis la nuklean forton. Sed male je nia uzado, ne laŭ maniero negativa kaj detrua, sed laŭ maniero pozitiva kaj konstrua, per sintezo de la atomo.

Tiu unua homa raso, tuj kiam ĝi estis sufiĉe nombra kaj civilizita, — eble antaŭ 100 000 aŭ 150 000 jaroj — sendis migrantojn por loĝigi ĉiujn loĝeblajn partojn de la tero. Pro du ĉefaj kaŭzoj. La pliiĝo de la loĝantaro necesigis la kreadon de novaj loĝocentroj. La kontinento tute ne havis tian eblecon sur sia tuta surfaco. En kelkaj regionoj, la vulkana aktiveco estis konstanta kaj intensa. Ĝi ankoraŭ ekzistas en la « Fajra zono de Pacifiko ». En aliaj lokoj, Lemurio estis surkreskita de densegaj praarbaroj, aŭ surportis vastajn kaj profundajn marĉojn. Tie svarmis la prahistoriaj gigantaj animaloj. Oni ne forgesu, ke la Lemurianoj estis samtempuloj de tiuj teruraj antaŭdiluvaj bestoj, kies skeletoj estis trovitaj en la tero. Tiaj bestegoj estis sur la tero, en la aero, en la maro. La dinosaŭroj estis ĝis 30 metrojn longaj, kaj pezis plurajn tunojn. En la aero flugis ptedoraktiloj, aliaj flugbestoj, kaj gigantaj birdoj. Iu aglo havis dekmetran enverguron. En la maro, la pleziosaŭro aŭ marserpento, la prapatroj de la balenoj ne estis malpli volumenaj. La insektoj eksterodinare kreskis. Fosilioj de formiko aŭ ties prapatro estas longaj ĝis dek centimetroj. Malgraŭ ĝia vasta etendiĝo, la kontinento Mu tute ne estis loĝebla sur sia tuta surfaco. Krome, oni povas kredi, ke la kleraj Lumerianoj antaŭvidis la estontajn kataklismojn, kaj eble eĉ la malaperon de la kontinento.

Do, la Lemurianoj kreis koloniojn ĉie, kie ili trovis loĝeblajn terojn. Ili popolizis Hiperboreon, nun kuŝantan sub la glacioj de la Norda Poluso, kelkajn partojn de Azio, kiel ekzemple Siberion, kiu entenas milojn da neesploritaj tomboj, kaj estis la legenda imperio de la Uiguroj. Antaŭ proksimume 50 000 jaroj, Atlantiso post sia leviĝo fariĝis la rifuĝejo de nekonata nombro de Lemurianoj; ĉar je tiu epoko, ilia patrujo parte submariĝis, kaj detruiĝis granda parto de la popolo. La civilizo alportita en Atlantiso de la eskapintoj, disvolviĝis kaj atingis sian klimakson antaŭ eble 18 000 jaroj, kaj detruiĝis post ĉirkaŭe 6 000 jaroj pro la « Universala Diluvo ».

La rapideco kaj amplekso de la katastrofo ebligis nur al tre malmulte da Atlantisanoj eskapi... La popoloj aŭ triboj, izolitaj sur la supro de montoj, sur insuloj, estis senigitaj de ĉiuj vivrimedoj, kaj devigitaj dediĉi siajn tutajn fortojn al malfacila postvivado. Kelkaj regresis, kaj fariĝis tiuj de ni nomataj « sovaĝuloj » aŭ « primitivuloj ». Aliaj malmultaj povis rifuĝi en kavernoj aŭ grotoj. Inter ili estis sendube kelkaj inicitoj je la altaj sciencoj de Atlantiso kaj Lemurio. Devigitaj unue prizorgi sian postvivon, senigitaj de ĉio, sen laboriloj, sen instrumentoj, ili devis restarigi novan homaron kaj novan civilizon Ili estas la konstruintoj de la megalitaj monumentoj misteraj kaj imponaj, kaj la verkintoj de la admirindaj surrokaj desegnoj kaj pentraĵoj, kaj de la skulptitaj rokoj ĉie troveblaj en la mondo.

Reale, la Atlantisaj eskapintoj estas niaj jusaj prapatroj. Egiptujo pro sia proksimeco estis ilia plej grava kolonio. Tie ili alportis sciencon kaj civilizon, kiuj estas la fundamentoj de nia nuna mondo. Iliaj sekretoj, ne diskoneblaj al ne sufiĉe evoluinta popolo, ne estas ankoraŭ nun tute malkaŝitaj. Ili ne perdiĝis, sed ĉiam daŭradis en formo de esotera kaj sekreta tradicio, ĝis nun vivanta en la inicaj societoj naskiĝintaj el la Egiptaj « Lernejoj de Misteroj ». Iom post iom, tiu kaŝita scienco malkaŝiĝas. La nova erao jus komenciĝinta ebligas, ke ni esperu pli rapidan evoluon de la homaro al ĉiam grandiĝanta progreso.

Sed ni ne forgesu, ke ni ŝuldas la originon de nia civilizo, kaj ties progresojn al niaj prahistoriaj prapatroj, Lemurianoj kaj Atlantisanoj.

Eloi MOTILLON.

Lumineskaj Bestoj

Ĝis tiam la « Mondo de la Silento » montris nenian vivo-signon. Auguste Picard, kun la nazumo ĉe la luko de sia batiskafo, funde esploris la nigron de la abismoj.

Subite okazis fantasta luma baleto : fajreroj, lanternoj, kometoj, ruĝaj, bluaj, verdaj, blankaj, kaskade aperis. La manometro montris 800 metrojn.

Dum kelkaj momentoj la nigro refermiĝis sur tiun strangan spektaklon... kaj denove aperis la lumaj figuroj : ili kune iris aŭ renkontpasis ; ili senmoviĝis aŭ daŭrigis sian fosforeskan dancon ; ĉi tie meduzoj, kalmaroj, salikokoj, ĉiaj fiŝoj promenis en la obskureco de la mara universo siajn lumojn senvarmajn.

La lumo-organoj de tiuj bestoj mirigis la biologojn : sen produkto de varmo, do sen perdo de energio, moluskoj, fiŝoj, krustacoj, kapablas eligi lumon !

Plej ofte la fiŝoj de la abismoj estas blindaj kaj ŝajne ne bezonas lumon (ĉu, kiel la proteo senokula, kiu vivas en la profundaj grotoj, ili sentas la lumon tra sia haŭto ?).

Tiu lanterno staras aŭ sur vosto, aŭ sur ventro, aŭ sub blinda okulo. Kelkfoje pigmentita kolora filtrilo sin ŝovas antaŭ la lanternon por ŝanĝi la koloron de la luma fasko ; fine nigra ŝovŝirmilo tute kaŝas la lumon.

Kelkaj biologoj opiniis, ke fosforesko ĉe bestoj estas lukso aŭ forĵetita energio. Tamen tiuj perfektigitaj reflektoroj kun lensoj, koloraj filtriloj kaj ŝovŝirmilo ne povas esti frukto de hazardo ! Je kio tiuj braĝoj utilas ?

La lampiro de niaj kamparoj.

La lampiro estas koleoptero. Plej ĝenerale estas la femalo, kiu eligas lumon ; tamen ĉe kelkaj specioj ankaŭ la masklo lumas. Li havas larĝajn okulojn kaj flugilojn ; dum la someraj noktoj, li flugas, simila al falanta stelo sur la ĉielo, serĉe al sia Damo. Tiu ĉi kuŝas tere en arbetaĵo aŭ sur herbo ; ŝi ne forgesas eklumigi sian lanternon ; ŝi montras sian verdan signalon, ĝin estingas, ĝin denove eklumigas ; ŝi bone scias, ke intermita lumo vidiĝas de pli malproksime ol kontinua lumo !

La masklo vidis la lumon ; la paro sinkronigas siajn signalojn. Finfine, Sinjoro alteriĝas apud sian belulinon : kondiĉe, ke li ne ĵus ekvidis pli brilantan femalon ! intenseco de la lumo investas pli fortan allogon ! Tial, la spertaj « vekantinoj » akceptas plurajn edzojn kaj nur frumatene mallumigas sian lanternon. La ovoj, ĉiuj estas fosforeskaj, venos 2 tagoin pli poste, kaj estos forlasitaj, hazarde, en humida loko.

La abdomeno de la lampiro portas tute simplan lumilon : la lumdonantaj ĉeloj situas antaŭ blanka reflektoro ; kiel ĝi funkcias ? Oni nur scias, ke tiuj ĉeloj entenas du kemiajn substancojn, ne tre bone konatajn : la « luciferine » kaj la « luciferase » ; kiam tiuj substancoj estas apartigitaj, ne estas lumo ; miksitaj ili agas unu sur la alia : « luciferine » devigas « luciferase » oksidiĝi.

Tiu fenomeno, kiu okazigas lumon sen varmo, ŝajnas dependi de la centra nerva sistemo : la senkapigitaj lampiroj ne plu eligas lumon ! la fenomeno ŝajnas rezulto de la elektita nutraĵo : azota nutraĵo. Tiu malgrandega insekto atakas predojn, kiuj estas 20 kaj eĉ 30 foje pli dikaj ol ĝi, inter kiuj helikoj ; ĝi estas karnovora kaj vorema ; kiam la predo montriĝas tro dika por unu nura tago, ĝi scias ĝin paralizi per inokulado de sia toksika salivo ; tiuj pantagruelaj manĝegoj liveras al la lampiro grandan energion, kiun ĝi preskaŭ tute konsumas en sia lampo. Ĉu vere tiu luminesko estas amor-letero cele al reproduktado ?

Tamen la problemo ŝajnas pli kompleksa.

Ĉe aliaj bestoj, ne estas diferenco inter maskloj kaj femaloj. Ĉe la lucioloj, kies nuptaj fosforeskaj flugadoj oni vidas kelkfoje en la aeroj, ili tute same lumas. Same ankaŭ ĉe la abismaj fiŝoj. Danĝeraj ŝajnas tiuj lumoj, kiuj altiras la malamikojn ! La tinuso frandas la lumajn fiŝojn, kiuj ĝin fasinas kaj altiras. Ĉu la Naturo ilin oferis al predantoj ? kiel tiuj kankroj, kies pinĉiloj estas tiel pezaj, ke ili ne povas ilin movigi ? Sed, eble, tiu luminesko signifas : Atentu, mi estas ĉi tie !

La « cucujos » (esp. Kukujoj) estas koleopteroj konataj en Centra Ameriko kaj en Polinezio. Dum ilia flugado, la fosforesko, verda kaj oranĝkolora, estas tiel forta, ke 4-5 kukujoj en kaĝo sufiĉas al Indianoj por legi sian ĵurnalon. Okaze de festoj, la junulinoj portas kolierojn ornamitaj per lumaj kukujoj.

En Ĉilio kaj Paragvajo kelkaj vermoj, tute simile al niaj aviadiloj, montras papelbrumantajn lumojn : verdaj sur la flankoj, ruĝaj sur la posta ekstremaĵo. La melolonto « fervoja » estas tiel nomita pro la lanternoj ruĝaj kaj verdaj lokitaj laŭlonge de ĝia korpo. Kelkaj grandaj salikokoj, « la serĵestoj » ornamiĝas per 150 lumetoj disigitaj sur la tuta korpo. Same kiel granda ŝipo. la « Chauliodus » montras sur sia korpo duoblan vicon da lumigitaj lukoj. La « Lycoteuthis diadema » estas enorma molusko, cefalopodo, kiu vivas je 2 000 m. profunde en India Oceano ; longtempe oni rigardis ĝin kiel demonon ; ĝi lumegas per 22 brilegaj reflektoroj (4 blankaj sur la tentakloj, 10 bluaj sur la kapo, 4 blankaj sur la ventro, 2 bluaj sur la brankoj, kaj fine du ruĝaj sur la posta ekstremaĵo). En Nov-Zelando, alia molusko havas 90 lumojn, kiuj brilas kiel plej belaj rubenoj, topazoj, smeraldoj. Alia havas lumilon, kiu entenas du lensojn : unu ĵetas sian lumon vertikale, la alia, horizontale.

Dum la varmaj aŭgustaj noktoi, la noktiluloj, elementaj animaletoj, tute simile al kuiritaj maïzo-grajnoj, grupiĝas tiel grandnombre sur la plaĝoj, ke ili donas al la ondoj fantasmagorian aspekton de fajra tavolo.

Inter tiuj strangaj organismoj estas kelkaj, kies nomo « pyrosome » signifas « fajro-kapo ». Ili estas etetaj travideblaj cilindroj ; kiam ili ripozas, ili estas verd-flavetaj ; kiam ili ekscitiĝas, ili iĝas flame ruĝaj, kaj verdaj, kaj blankaj.

Kelkaj bakterioj kaj fungoj ankaŭ eligas tre fortan lumon. En bokalo tiuj lumineskaj bakterioj tiel forte brilas, ke ili povas konkurenci litkapan lampon. En Nov-Kaledonio la frenezaj dancoj de la noktaj festoj ĉiam okazas sub verda lumo de fungoj nomitaj pleŭtoroj.

Pri tiuj malsuperaj estaĵoj oni ankoraŭ ne precizigis la biologian rolon de tiu lumineskо. Tiuj bestoj agas tute kontraŭe de aliaj kiuj kaŝiĝas kaj metamorfoziĝas por resti nevideblaj ; ĉu nutro por predantoj ?
Ĉe aliaj lumo estas defendo-rimedo.

La fiŝoj « Macruridees » forĵetas lumon malantaŭ sin por blindigi la atakanton ; cetere, tiuj fiŝoj estas la nuraj, kiuj nehavas protektantain skvamoin. Sur mediteraneai bordoi estas kelkaj specioj de mituloj, kiuj, ankaŭ ili, forĵetas lumineskan mukon, kiam ili fermas siajn valvojn ; kiam la fermo estas rapida, la muko faras malgrandan luman fontanon.

La sensacia « Lasiognathus » havas, sur la nazo, fiŝbastonon, kiu estas tiel longa, kiel la korpo ; ĉe ĝia fino estas fiŝfadeno, fiŝhoko kaj luma logaĵo.

Kaj, ĉe la « Chaenophryne », tiu logaĵo tute similas ... luman salikokon !

Lumigi sian lanternon ? Kial ?

Ĉu por prilumi antaŭ si ? ĉu por ĉarmi amorantinon ? ĉu por blindigi malamikon ? ĉu por altiri, predojn ? ĉu por beligi la pejzaĝon ?

NOTOJ

Sekve de la artikolo de Marcelle Turin, aperinta en « Kultaraj Kajeroj » nº 5 (1973), pri la jugoslava verkisto Ivo Andriĉ, ni ricevis la jenajn informojn de S-ro Antonije Sekelj :

« La libro, kies titolon S-ino Turin tradukas « Estas Ponto sur la Drina », estis tradukita antaŭ 12 jaroj sub la titolo « Ponto super Drino », de S-ro A. Sekelj. Ĝis nun, la manuskriptoj ne estis eldonita, sed fragmento aperis en Heroldo de Esperanto en 1962.

Ivo Andriĉ ne ricevis la Nobel-premion por tiu verko sed por sia tuta verkaro ».

Post la artikolo de S-ro Van Aelst, « Lingva problemo en Belgio, alia sono » ni ricevis respondan artikolon de Dr F. Roose. Ĉar ni ne volas utiligi « Kulturaj Kajeroj »-n al sen finaj polemikoj, ni decidis, kun konsento de la aŭtoro, ne aperigi tium respondon. Sed ni informas la interesatain legantojn ke Dr F. Roose senpage sendos al ĉiuj fotokopion de tiu respondo. Skribi al Dr F. Roose Sinte Klaradreef, 59 - 8000 Brugge (Belgŭjo).

LA NEKONATO

(fino)

Oka sceno. Paŭlino - Ernestino - Infanoj.

(Mardon matene en la kliniko « Bubejo » ; Paŭlino alvenas kun la knabino ; deĵoras ĉe la pordo Ernestino, flegistino).

Paŭlino. — Bonan matenon.

Ernestino. — Bonan. Kion vi deziras ?

P. — Mi devas labori en tiu kliniko ; oni dungis min.

E. — Vian nomon, antaŭnomon, kvaliton ?

P. — Coulet Paŭlino ; flegistino.

E. — Mia persona nomo estas Ernestino ; ankaŭ mi estas flegistino ; ni laboros kune. (Infanoj eniras). Jen niaj infanoj ; tiu knabino restos kun ili. Ĉu vi jam vidis la direktoron ?

P. — Vi estas la unua persono kiun mi vidas (telefono sonoras ; E. prenas la aŭdilon).

E. — Oni vokas min. Mi konfidas al vi la infanojn. (Ŝi eliras).

P. — (Ŝi kaŭras kaj alparolas tute junan knabineton). Ĉu vi ĝojas ke mi restas kun vi ?

Knabineto. — Jes, mi ĝojas, ĉar vi ŝajnas esti bona sinjorino.

P. — (Alparolas knabeton). Kaj vi, ĉu vi ĝojos esti mia amiko ?

Knabeto. — Jes, mi ĝojos se mi rajtos fari ĉion kion mi volos.

Naŭa sceno. Paŭlino - Viktorino.

(Viktorino, mezaĝa fraŭlino, eniras).

Viktorino. — Ĉu vi ne estas la flegistino Paŭlino Coulet ?

P. — Jes, mi estas (ŝi ekstaras. Ernestino revenas kaj foriras kun la infanoj).

V. — Mi vidas ke vi jam havas amikojn inter la infanoj.

P. — La infanoj sentas kiam ili estas amataj.

V. — Ŝajnas ke vi logas ĉiujn, al kiuj vi alproksimiĝas. Permesu ke mi gratulu vin : apenaŭ vi aperas ĉi tie kaj oni parolas pri via intenco edziniĝi kun la direktoro !

P. — Devas esti eraro koncerne la personon, ĉar eĉ mi ne konas sinjoron direktoron, kaj mi tre dubas ĉu li konas min.

V. — Mi petas vin kredi ke mi konas la aferon : mi estas fraŭlino Viktorino, la fratino de la direktoro.

P. — Mi havas la honoron saluti vin, fraŭlino, sed mi estas devigata certigi al vi ke nek temas, nek temis pri edziniĝo de mi kun via frato, kiel mi jam diris.

V. — Ni reparolos pri tio (ŝi foriras).

Deka sceno. Paŭlino - La Nekonato.

(Paŭlino restas longan momenton sola ; la Nekonato eniras).

Paŭlino. — Ha, sinjoro, vi estas ĉi tie ! Kia plezuro retrovi vin, sed en kia situacio ! Mi tute ne povis imagi : laŭ la konsilo de miaj labordonantoj kaj amikoj, d-ro Galou kaj lia edzino, mi lasas min dungi en ci tiu kliniko, kaj antaŭ ol mi komencas labori, mi renkontas la fratinon de la direktoro, kiu akuzas min intrigi por edziniĝi kun ŝia frato kiun mi eĉ ne konas !

La Nekonato. — Tiu novaĵo ŝajnas emociigi vin, sed mi ne komprenas la kauzon.

P. — Tiu sinjoro ne konas min ; almenaŭ ne sufiĉe por dediĉi sian vivon al mi, kaj por postuli de mi la oferon al li de mia vivo. Ĉar ja tio estas edziĝo ; la soleno estas nenio ! Aŭ ĉu li deziras ke mi iĝu la pupino de lia kliniko ?

La N. — Skribu al li ke per lia fratino vi aŭdis pri lia projekto, kaj mi transdonos al li la leteron.

P. — Ho, mi dankas ! Se vi deziros, vi rajtos legi tiun leteron. Sinjoro, ĉu vi ne aprobas mian konduton ?

La N. — Vi povas skribi ke vi ne konsentas edziniĝi, ĉar vi ne sufiĉe bone konas lin.... Dum vi skribos, mi okupiĝos pri nia tagmanĝo. (li foriras).

Dekunua sceno. Paŭlino (sola).

Paŭlino (diras laŭte kion ŝi skribas) : Tre estimata sinjoro direktoro .... granda honoro .... mi estas humila dungitino .... iĝos direktorino .... avantaĝoj .... honoroj .... via sindonema Paŭlino Coulet. (revante) Stranga okazaĵo ....

Dekdua sceno. Paŭlino - La Nekonato.

La Nekonato (eniras). Ĉu vi skribis dum la tuta tempo ?

Paŭlino. — Jes, mi skribis multe, tiel ke la afero estu senduba. Jen la letero ; bonvolu doni ĝin al sinjoro direktoro ; se li montros ĝin al vi, vi rajtos legi.

La N. — Dankon. Iru nun tagmanĝi. Bonan apetiton (P. eliras).

Dektria sceno. La Nekonato - F-ino Viktorino.

F-ino Viktorino (eniras). Kion diras la fraŭlino ? Kiun rolon ŝi ludas ?

La N. — Ŝi diras ke ŝi ne volas edziniĝi kun la direktoro. Jen letero kiun ŝi skribis por diri tion al li (li malfermas la koverton).

V. — Nu, legu!

La N. (legas). — « Tre estimata sinjoro direk-
« toro, per via fraŭlino fratino mi eksciis ke vi in-
« tencas svati min. Certe estas por mi granda ho-
« noro, ĉar vi estas klera homo, dum mi estas mal-
« klera. Vi estras gravan entreprenon, kies dungitino
« mi estas la plej nova, la plej suba; kiel mi ne es-
« tus dankema al vi pro la sento kiun vi montras
« al simpla, sensignifa flegistino? ankaŭ mi ne po-
« vas ignori ke de la plej malalta loko mi subite
« atingos la plej altan. Kia paŝo, de subulino iĝi
« direktorino! Ankaŭ mi povus mencii monajn
« avantaĝojn, kaj la titolon, kaj tiom da belaĵoj ....
« Ĉu ne estus stulte, pli ol stulte rezigni pri tia
« situacio, kiun mi certe ne meritas, sed kiun vi
« bonvolas prezenti al mi ».

(li ĉesas legi). Mi ne scias kial tiu pupino ŝajnis al mi malsimila al la aliaj.

V. — Ankaŭ mi ne scias. Sed estas pli bone esti certa. Nu, kial vi ne legas ĝis la fino? (Ŝi prenas la leteron kaj plulegas). « Vi vidas, sinjoro direk-
« toro, ke mi bone konas la avantaĝojn, kiujn pre-
« zentus al mi edziniĝo kun vi. Certe se iu scias
« ke mi ne konsentas tian profitplenan aferon, tiu
« mokos min. Tamen mi ne povas rezignaci pri
« edziniĝo en tiaj cirkonstancoj, vere mi ne po-
« vas! Mi esperas nur ke vi ne estos kolera kon-
« traŭ mi pro mia malafabla respondo, ĉar mal-
« graŭ ĉio mi restos via respektoplena kaj sindo-
« nema Paŭlino Coulet ».

La N. — Kion vi konkludas, kara fratino?

V. — Mi ne scias... Ĉu ŝi diras la veron? (telefono sonoras).

La N. — t.e. d-ro Tarel (prenas la aŭskultilon). Mi aŭskultas. Kiu petas vizitpermeson? Ĉu sinjorino Coulet? Sendu ŝin al la akceptejo. Serĉu f-inon Coulet kaj sendu ankaŭ ŝin al la akceptejo. Dankon.

Dekkvara sceno. Paŭlino - S-ino Coulet (en la akceptejo).

(Paŭlino eniras de dekstre, s-ino Coulet de maldekstre. Ili ĉirkaŭbrakas, kisas kaj rigardas unu la alian).

Paŭlino. — Panjo, vi restas ĉiam juna!

S-ino Coulet. Ĉu vi ne plu laboras en la sama kliniko?

P. — Ne. Mi ne havis tempon skribi al vi, ĉar okazis tiom da ŝanĝoj en malmulte da tempo, ke mi ne plu scias ĉu mi sonĝas aŭ ĉu mi maldormas. Ekzemple la direktoro de tiu kliniko svatis min.

S-ino C. — Do vi estas fianĉino.

P. — Ne, ĉar mi rifuzis.

S-ino C. — Vi rifuzis; Ĉu vi estas freneza?

P. — Pli ol freneza. Mi enamiĝis ....

S-ino C. — Ĉu la feliĉulo en kiu vi enamiĝis estas alia direktoro de kliniko?

P. — Panjo, ĉu vi opinias ke mi edziniĝos kun viro pro lia situacio? Ĉu vi kredas min aĉetebla? Vi mem edziniĝis, ĉu pro amo aŭ pro mono? Mi deziras doni kaj ricevi feliĉon. La viro al kiu mi enamiĝis estas bona homo; mi plaĉas al li, li logas min. Krom tio mi scias nenion pri li: hazarde mi renkontis lin, hazarde li retrovis min ...

(telefono sonoras. Paŭnjo respondas). Ĉi tie Paŭlino. Jes. Mi venas tuj (al sia patrino). Oni vokas min; mi revenos rapide. (ŝi eliras).

Dekkvina sceno. D-ro Tarel - S-ino Coulet.

D-ro Tarel. Ĉu mi havas la honoron paroli kun la patrino de f-ino Coulet.

S-ino Coulet. — Jes, ŝi estas mia filino. Nu, mi ne scias, ĉu ŝi estas ankoraŭ mensosana. Ŝi diris ke la estro de ĉi tiu kliniko svatis ŝin, kaj ŝi rifuzis.

T. — Estas la vero. Jen la letero kiun ŝi skribis al li.

C. — Kiu estas tiu nekonato al kiu ŝi enamiĝis?

T. — (rapide) Kiel vi scias, ke ŝi enamiĝis?

C. — Ĉar ŝi mem diris al mi. Kiel ŝi konatiĝis kun li? Kiel li retrovis ŝin? Ŝi mem diris al mi ke ŝi konas nenion pri li!

T. — Tion mi rakontos al vi; aŭ pli bone mi lasos tium magnetofonon paroli, ĉar mia amiko, d-ro Galou, registris nian interparolon. Tio okazis antaŭhieraŭ matene, tre frue, en la loĝejo de gesroj Galou. Ili estas la estroj de la kliniko « Ripojriparejo », kie laboris ĝis nun f-ino Paŭnjo, kaj ili ambaŭ partroprenis tiun interparoladon.

(d-ro Tarel kaj s-ino Coulet aŭskultas la magnetofonon).

Deksesa sceno. D-ro Tarel - ges-oj Galou.

(la sonorilo tintas)

S-ino Galou. — Oni sonoris. Ĉu vi atendas iun?

D-ro Galou. — Neniun. Dimanĉon matene ... estas surprizo. (d-ro Tarel eniras). Ha! Tarel ... kiel vi fartas? Ni ĝojas vidi vin, sed kiel vi alvenas tiel frue?

D-ro Tarel. — Bonan matenon al vi ambaŭ. Mi petas pardonon: mi alvenas neatendite ... Ĉu vi memoras kion ni vetis lastan semajnon?

G. — Certe: ni vetis, aŭ pli bone mi vetis ke, se vi sufiĉe longe fastos, vi ŝtelos aŭ almenaŭ intencos ŝteli ion por manĝi. Laŭ mi, la instinkto pri memkonservo estas tia...

T. — ...do vi perdis la veton, ĉar mi ne intencis ŝteli, kvankam mi fastis jam de longa tempo, kiam mi preskaŭ svenis hieraŭ vespere sur la trotuaro de « Boulevard Arago ». Mi estis falonta, sed du fraŭlinoj subtenis min...

D-ro G. — ...fali en la brakojn de du ĉarmulinoj! Mi komencas tuj fasti!

S-ino G. (ŝerce). Vi rajtas ne averti min!

T. — Mi parolas serioze.

D-ro G. — Ankaŭ mi. Ĉu viaj ĉarmulinoj donis al vi ion por manĝi ?

T. — Unu devis tuj foriri. La alia restis kun mi. Mi demandis ŝin pri si mem. En ŝiaj respondoj mi rimarkis tiom da sincereco, da kuraĝo, da natura saĝeco...

S-ino G. — ... ke vi enamiĝis !

G. — Kiam ŝi iĝos sinjorino Tarel ?

T. — Ŝercu ! Jes, vi rajtas ŝerci, ĉar mi mem ne plu estas juĝokapabla.

S-ino G. — Kiel nomiĝas tiu duonanĝelo ?

T. — Mi ne scias ; mi nenion scias pri ŝi krom tio : ŝi estas flegistino en granda kirurgia kliniko ; ŝia nomo estas Paŭlino sed oni nomas ŝin Paŭnjo ; ŝi venas el nord-francujo, estas abiturientino kaj komencis studi medicinon.

G. — Ŝi povus esti Paŭlino Coulet. Ĉu vi deziras dungi ŝin ?

T. — Se eble, jes ; mi estas preta fari por ŝi ĉiujn oferojn.

G. — Pri tio mi ne dubas, sed vidu : ĉi tiu estas ĝenerala kirurgia kliniko ; al la malsanuloj kiujn ni havis antaŭe aldoniĝas nun vunditoj pro aŭtoakcidentoj. Sed kial vi deziras dungi ŝin ? Vi ne deziras edziĝi kun ŝi proksiman semajnon ?

T. — Unue mi dezirus doni al ŝi eblecon fini siajn medicinajn studojn.

G. — Mi certigas al vi ke, se vi ne estus mia amiko, mi ne lasus tiun fraŭlinon forlasi mian klinikon : ne sufiĉas diri ke ŝi estas perlo ; ŝi estas diamanto. Sed se ŝi konsentas ... (al sia edzino). Nu, karulino, kion vi opinias ?

S-ino G. — Aŭdante vin laŭdegi inon kiel vi faras, mi devus esti ĵaluza ; sed Paŭnjo estas kiel mia amata fratino ; plie mi kredas, ke ni ne rajtas malhelpi tiun junulinon akiri la doktorecon...

G. — Do, konsentite. Sed vi povas danki mian edzinon, ĉar se estus nur mi...

T. — Mi atendas tiun fraŭlinon morgaŭ aŭ postmorgaŭ matene ; dankon, sinceran dankon al vi ambaŭ. Ĉu vi baldaŭ vizitos min ?

G. — Jes, baldaŭ. Nu, vi ekstaras ; ĉu vi jam iras for ?

T. — Proksiman semajnon mi revenos. Ĝis revido. Ankoraŭan dankon.

Ges-oj G. — Ĝis revido.

Deksepa sceno. D-ro Tarel - S-ino Coulet.

S-ino Coulet (viŝas larmon ĉe angulo de sia okulo). Mi ja opiniis ke ŝi estas amata ĉe la « Ripojriparejo », sed aŭdante tion, mi...

D-ro Tarel. — Ĉu vi ne kredas ke via filino estas prava ami tiun nekonaton ?

S-no C. — Sed, sinjoro, vi ne diris ke vi estas tiu nekonato. Eĉ Paŭnjo ne scias. Ĉu vi ne intencas diri al ŝi ? Vi certe rimarkis, ke patrinoj urĝas edziniĝon de siaj filinoj ; ĉu ili estas pli-malpli ĵaluzaj pri ili aŭ ĉu ili arde deziras ilian feliĉon, pri tiu demando aliaj diskutu. Sed en la nuna kazo, ĉu vi ne iom tro rapidas ?

T. — Vi eble kredas ke tempo estas taŭga rimedo, kiam viro enamiĝis, por juĝi pli kaj pli ĝuste la agojn kaj parolojn de la amata ino.

S-ino C. — Mi bone scias ke tempo ne estas rimedo, tute male : ju pli viro vidas kaj aŭdas la amatinon, des pli li enamiĝas, des pli li vidas ŝin per ĉarmataj okuloj, aŭdas per ĉarmataj oreloj, tiel ke la amatino iĝas pli kaj pli amata.

T. — Tion oni nomas « kristaliĝo ».

S-ino C. — Mi ne scias ĉu, mia filino iĝas pli kaj pli kristalo. Mi nur deziras ŝian feliĉon. Ĝis nun vi ne rimarkis la difektojn unu de la alia ; vi ne havis tempon konstati ĉu viaj karakteroj kaj temperamentoj harmonias aŭ ... ne harmonias. Nu tempo kapablas halti aŭ almenaŭ bremsi movon kiu kreas mem sian motoron ; ĉar vi ne povas nei ke amo estas forto, kiu kreskas pro la fakto ke ĝi funkcias

T. — Sinjorino, vi parolas kiel advokato.

S-ino C. — Ne moku, mi petas.

T. — Mi diras nur la veron ; mi diras kaj admiras vin. Ĉar la poetoj konstatis tiun « kristaliĝon », sed vi klarigas ĝin. Nu vidu, via filino kaj mi, ni ekamis subite unu la alian, tio estas fakto. Sed ni ne povas edziĝi antaŭ longa tempo : Paŭnjo (permesu ke mi nomas ŝin tiel) devas unue akiri doktorecon. Nur poste ni provos fondi familion... kun via permeso.

S-ino C. — Unue ni devas demandi la precipan koncernatinon, kion ŝi opinias.

Dekoka sceno. S-ino Coulet - D-ro Tarel - Paŭlino.

Paŭlino (ŝovas kapon inter pordon kaj kadraĵon) Senkulpigu, sinjoro Nekonato ! (ŝi ridas).

Tarel. — Vi ridas, do vi scias, kiu mi estas !

P. — Fine mi divenis, mi stultulino !

T. Al s-ino C. — Vi rajtas diri al ŝi nian konkludon.

S-ino C. — Se mi bone komprenis, ŝi laboros en via kliniko, kaj samtempe preparos la doktorekzamenon. Kaj kiam ŝi havos ĝin, la direktoro svatos ŝin kaj ili edziĝos ... se ili ankoraŭ estas konsentaj.

P. — Panjo, ĉu mi maldormas ? ĉu mi sonĝas ?

S-ino C. — Kara finjo, vi vivas. Tio estas vivo, sed...

P. — Sed... ?

S-ino C. — Sed en la vivo ni neniam antaŭe scias kio okazos. Ni preparas la estontecon, sed kiam morgaŭ iĝas hodiaŭ, ĝi aperas tute alia.

P. — Panjo, vi estas pesimisto.

S-ino C. — La sola maniero por iĝi ĉarmata de la hodiaŭa tago konsistas el iom da dubo koncerne la morgaŭan.

P. — Des malpli bone : mi ne zorgas pri la elreviĝo kiun morgaŭ alportos, kondiĉe ke hodiaŭo ŝutas feliĉan feliĉon sur min. Okazu kio ajn, mi alportos al mia fianĉo sinceron kaj amon. Eĉ koncerne la situacion, mi esperas esti digna je li.

T. — Atentu : al la komuneco mi alportas kvindek infanojn !


P. — Tiom mi ne povas promesi...

En Esperanto originale verkita de P. Boulogne.

POR VIA DISTRO

SOLVOJ DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ

Ĉifra enigmo



La trovota ĉina enigmo estis : Feliĉa estas la popolo kiu siajn grandajn virojn en la ĝusta tempo la kvar linioj kaj striojn inter la vortoj, kaj nun la vortoj estas legeblaj.

Nombra enigmo

Lax trovota ĉina enigmo estis : Feliĉa estas la popolo kiu siajn grandajn virojn en la ĝusta tempo senkapigas.

NOVAJ PROBLEMOJ

(proponitaj de S-ro Salasc)

Birdĉasado

Mezen de la sekvantaj vortoj, intermetu plian silabon por fari novan vorton. La legado vertikale de la aldonitaj silaboj aperigos la nomon de la birdoj ĉasataj.

Ekzemple : TARO TA-PI-RO

RELO RE-GO-LO

La birdo estas PIGO

SEMO	GRILO	ORO	PAVO
TURO	VALO	PASO	PAFO
ROKO	VINO	SELO	PEKO
VARO	KOLO	KATO	MULO
			KASO

Tramo kaj Piediranto

Piediranto kiu marŝas je 6 kilometroj po unu horo iras de A al B. Je du kilometroj de A, tramo kiu eliris el A 10 minutojn post la piediranto, preteriras lin, alvenas en B, kie ĝis restas 10 minutojn kaj revenante de B al A, renkontas denove la piediranton. La distanco inter la du renkontoj estas 11,333 km. Kalkulu la distancon AB, inter la du haltoj de la tramo.

Ir-Reira enigmo

La solvo de tiu-ĉi enigmo estas trovebla tiamaniere : dividu ĉiun sesliteran vorton laŭ du egalaj partoj, elprenu unu literon el la unua duonparto de ĉiu vorto de 1 ĝis 12 ; poste, elprenu unu literon el la dua duonparto de ĉiu vorto, reirante, le 13 ĝis 24. La legado de la elprenitaj literoj en tiu ordo vidigos la trovotan proverbon :

dukino — idilio — furoro — enhavo — banano — avenuo — malhel' — asepso — borago — brovoj — okzalo — senhar'.

Silaba enigmo

Laŭ la sekvantaj difinoj, trovu 25 trisilabajn vortojn, kies meza dulitera silabo estos unu el la jenaj : BE — GO — GO — KA — KA — KO — KU — LA — LE — LE — LI — LI — LU — ME — MO — NE — NI — NI — NO — NU — PE — RA — RA — RI — RI.

1) Plej granda simio.
2) Enigmo.
3) Kapvesto.
4) Duaorda kurbo.
5) Batala agado.
6) Granda boato.
7) Surskribita paperfolieto.
8) Greno por fari farunon.
9) Rabobesteto.
10) Malprava kontraŭago.
11) Aro da kampulaj domoj.
12) Araba regnestro.
13) Metala plato.
14) Rajdarta lernejo.
15) Genro de papagoj.
16) Bongusta frukto.
17) Brusta korpoparto.
18) Altestimo.
19) Kojndento.
20) Meblo.
21) Antikva militŝipo.
22) Centro, ĉefa punkto.
23) Danĝera haŭtmalsano.
24) Manĝebla vegetalo.
25) Uzata por tegmentoj.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

KOMUNAJ NOMOJ

Oni apartigas la nomojn laŭ du klasoj :

Komunaj nomoj — Propraj nomoj.

Komunaj nomoj (PIV) montras klason aŭ specon de uloj aŭ aĵoj : pioniro, metiistoj, sciuro, platformo.

Gramatike, ili estas substantivoj kun O-finaĵo, el substantiva radiko, el derivado, el kunmetado : mirto, manĝo, kampulo, dormo-cambro.

Kunmetaĵo ĉiam montras tre precizan ulon aŭ aĵon : grandegulo (giganto) — velŝipo (speciala ŝipo).



Nesubtileco


— Fraŭlino, mi tute ne ŝatas, ke miaj oficistinoj venas rekte de la maskita balo al nia oficejo !

— Sed, Sinjoro, mi venas rekte de la butiko, kie mi aĉetis, tre koste, tiun lastmodan kostumon. Kompreneble, vi multe bezonas okulvitrojn, ĉar vi eĉ ne vidis, en via spegulo, la kismakulojn sur via vango.



Malfacila senarmaĵiĝo

Karulino mia, mi petas vin rapidu ! Mi certigas al vi, ke vi estas alloga ĉarmulino ; via robo estas plej eleganta ; via hararanĝo plej taŭgas al via personeco kaj via ŝminko igas vin 20 - jarulino. Sed jam delonge mi estas preta kaj ŝajnas al mi, ke mia armaĵo kaj mi estas rustiĝantaj.



Ĉu bona rolulo ?

Vidu kiel paĉjo bone ŝajnigas la leporon, kiu alportas la paskajn ovojn en nian ĝardenon ! Jam de kelka tempo mi pensas, ke li povus esti ankaŭ la cikonio, kiu alportas la bebojn en la lulilojn !

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (66 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux. BARCHON, Lg. (120 fr.).

Britujo : S-ro John Rapley, 156, Wanstead Park Rd., ILFORD, Essex IGI 3 TP, ĝiro 50 292 3008 (140 p.).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (20 kr.).

Finnlando : S-ro Jussi Jäntti, Esperantotie 4, SF 02220 IRISLAHTI (13 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (9,3 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (170 pes.).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (900 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (48 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk. 209721 (9 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (18 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, al. Valea Rosie 4, ap. 69, B.P. 8/4 BUKURESTI - 66.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (13 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (11 fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO Box 1231, BANGKOK (4 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (4 dol.).

Allaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (18 respk.),



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝango de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier

Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au n° 1 de 1974, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Il est désagréable de devoir dire que ce qui a été annoncé il y a deux mois est remis en cause. Dans notre dernier numéro, nous avions donné les nouveaux tarifs de séjours établis en octobre pour tenir compte des augmentations subies depuis septembre 1972. Ces hausses décidées en octobre étaient évidemment dépassées au mois de juillet suivant, chaque année. Mais cela n'avait pas une très grande importance dans la mesure où l'augmentation des prix de revient n'excédait pas un taux raisonnable. En 1973, cependant, l'augmentation prévue en octobre pour 1974 « épongeait » à peine la hausse subie pendant l'année. Et, maintenant, il nous faut à nouveau revoir nos tarifs, car il n'est pas pensable que la gestion puisse être saine en appliquant en juillet des prix fixés neuf mois plus tôt. C'est pourquoi, les prix annoncés subiront une augmentation de 8 à 10 % à partir du mois d'avril. Nos amis comprendront que nous n'avons pas pris cette décision de gaieté de cœur. Mais nous risquerions, si nous ne l'avions pas prise, de ne pouvoir qu'assurer un entretien minimum du château.

Cette année, étant donné les circonstances, les inscriptions viendront sans doute tard. Pour les vacances de printemps, à la date ou j'écris ces lignes, elles sont peu nombreuses. Pour l'été, les demandes de renseignements sont un peu moins nombreuses que l'an dernier. Mais je pense qu'elles se multiplieront à l'approche des vacances et qu'elles viendront, en particulier, de vous, tous nos amis qui nous avez toujours aidés et qui viendrez avec vos amis.

P. BABIN.

Supplément au n° 1 de 1974, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Il est désagréable de devoir dire que ce qui a été annoncé il y a deux mois est remis en cause. Dans notre dernier numéro, nous avions donné les nouveaux tarifs de séjours établis en octobre pour tenir compte des augmentations subies depuis septembre 1972. Ces hausses décidées en octobre étaient évidemment dépassées au mois de juillet suivant, chaque année. Mais cela n'avait pas une très grande importance dans la mesure où l'augmentation des prix de revient n'excédait pas un taux raisonnable. En 1973, cependant, l'augmentation prévue en octobre pour 1974 « épongeait » à peine la hausse subie pendant l'année. Et, maintenant, il nous faut à nouveau revoir nos tarifs, car il n'est pas pensable que la gestion puisse être saine en appliquant en juillet des prix fixés neuf mois plus tôt. C'est pourquoi, les prix annoncés subiront une augmentation de 8 à 10 % à partir du mois d'avril. Nos amis comprendront que nous n'avons pas pris cette décision de gaieté de cœur. Mais nous risquerions, si nous ne l'avions pas prise, de ne pouvoir qu'assurer un entretien minimum du château.

Cette année, étant donné les circonstances, les inscriptions viendront sans doute tard. Pour les vacances de printemps, à la date ou j'écris ces lignes, elles sont peu nombreuses. Pour l'été, les demandes de renseignements sont un peu moins nombreuses que l'an dernier. Mais je pense qu'elles se multiplieront à l'approche des vacances et qu'elles viendront, en particulier, de vous, tous nos amis qui nous avez toujours aidés et qui viendrez avec vos amis.

P. BABIN.

POÉSIE — THÉATRE

Arĉoj (G. Mattos)	10,00
Cigana romancaro (F. Garcia Lonca)	13,00
Ĉielarko (Baghy)	8,50
Dia Komedio (Dante)	85,00
Duonvoĉe (Maura)	10,00
Ekzilo kaj Azilo (Emba)	10,00
Esperanta antologio	25,00
Eta vivo	12,00
Fajro sur mia lango (de Kock)	10,00
Ĝoja podio (Schwartz)	8,00
Gajaj edzinoj de Windsor (Shakespeare)	3,00
Georgo Dandin (Molière)	5,00
Hamleto (Shakespeare ; trad. Newell)	15,00
Hamleto (trad. Zamenhof)	15,00
Humoroj (Auld)	12,00
Infana raso (W. Auld)	10,00
Kantoj kaj Romancoj (Heine)	26,00
Kontralte (Boulton)	12,00
Kriol el Mallumo (Svetinov)	7,00
Libro de amo (Peneter)	30,00
Mokindaj preciozulinoj	3,00
Nova Ezopo (Urban)	7,00
Nur tri koloroj Urbanova)	8,00
Parnasa gvidlibro	12,00
Peer Gynt (Ibsen) relié	12,50
Pinta krajono (Rossetti)	8,00
Provo alfronti la vivon (Georgiev)	8,00
Revizoro (Gogol)	6,00
Romeo kaj Julieto (Shakespeare)	3,00
Rozoj kaj Urtikoj (Thorsen)	12,00
Sen eliro — La respektema P... (Sartre)	12,00
Sen paraŝuto (Thorsen)	8,00
Soifo (Tarkony)	14,00
Sub stelo rigila (Hamri)	10,00
Sur la vivovojo (Logvin)	10,00
Ŝtupoj sen nomoj (Ragnarsson)	8,00
Tempesto (Shakespeare)	12,00
Topaze (Pagnol)	12,00
Unufingraj melodioj (Auld)	8,00
Vesperkanto (Adamson)	10,00
Virino ĉe la landlimo (Boulton)	14,00

HISTOIRE — GÉOGRAPHIE SCIENCES — VOYAGES

Aktualaj problemoj (I. Lapenna)	10,00
Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj (Neergaard)	17,00
Bela subtera mondo (Tell)	12,00
La dolĉa Franclando	28,00
Dorse kontraŭ la muro (Wybenga) relié	24,00
broché	15,00
De Parizo al Lazura marbordo	3,50
El la polvo de la tero	10,00
Elingita glavo (Verdiro)	7,00
Gvidlibro tra Parizo (Julieta)	13,00
Kon Tiki (Heyerdahl)	20,00
Nobla korano	60,00
Princlando Andoro	9,00
Rakontoj pri Nederlando (Duhamel)	5,00
Senĝenaj dialogoj (Fernandez)	20,00
Tio, kion mi kredas (J. Rostand)	3,00
Vivo de Gandhi (E. Privat)	12,00

DIVERS

Gaja kantaro	2,00
Comment former un centre culturel	3,00
Cartes postales de Grésillon noires	0,50
couleurs	0,60
Cuillers souvenirs	9,00
Coupe-papier souvenir	12,00
Badge « Grésillon »	3,00
Porte-clés « Grésillon »	9,00
Vignettes « Grésillon » (les 10)	1,50
Esperanto kaj stelo (ovala glumarka)	1,50
Disque de stationnement	3,00
Insigno (stelo) pinglo	2,00

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

NOVAJO

Tablo Kalendaro DATO'ROY de la XXe jarcento, ekskluziva luksaĵo por ornami skribotablon, indikas ĉiujn tagojn de la samajno dum periodo de 100 jaroj (1900-2000), tre praktika (16 × 10,5 centimetrojn) .. 55,00

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. Babin

Prix : 8,50 F.